

**Eldonantaro:**  
 D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
 W. M. Page, adv., Edinburgh  
 Ernest Archdeacon, Paris  
 J. Gili Norte, Barcelona  
 Teo Jung, Köln (Kolono)  
 Frans Schoofs, Antwerpen  
 P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

**Administrejo:**  
 Horrem bei Köln, Germ.  
 Postkonton Köln 70863, por  
 Teo Jung, Horrem.

**Redaktoro:**  
 Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
 Kunredaktoroj: J. Fethke,  
 H. Hurler, Max Bullin.  
 Literatura red.: Zanonl.

**Kunlaborantoj**  
 Inter la Esperantistaro de  
 la tutmondo.

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

**Semajna**

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu lun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpigo de la sumo. Pri finigita abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. Germanoj abonu ĉe sia poŝtoficejo.

**Kun senpaga monata „Revuo“**

La prezo de unu numero estas por la landoj:  
 Aŭstra 800 Kr. Ĉeĥosl. 1,20 Kr. Hungara 30 Kr. Nederl. 0,15 Hfl. Rusa 40 Gmk.  
 Belga 0,50 Fk. Finna 1,20 Fmk. Itala 0,70 Lit. Norvega 0,20 Kr. Sveda 0,24 Kr.  
 Brazilo 5/10 Pc. Franca 0,20 Fk. Japano 0,10 Jen. Pola 1,20 Mk. Sviza 0,20 Fk.  
 Bulgara 3 Levaj Germana 30 Mk. Jugosl. 1,60 Din. Portug. 0,50 Esk. U. S. A. 0,06 Dol.  
 Dana 0,20 Kr. Hispana 0,20 Pes. Kanada 0,06 Dol. Rumana 3 Lei.  
 Balilkanoj demandu la prezon ĉe sia Abono o. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0,50 Fr. Fk. aŭ 1 stamplian Respond-Kuponon.

**Neŭtrala**

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4. Por Adresŝanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.  
 Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj.  
 Anoncoj kostas po cm<sup>2</sup> 0,10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpaĝo 40 gmk.); rabato laŭ interkonsento.

**Varbu anoncojn**  
 (nur komercin aŭ industrin)  
 por ĉi tiu kadro!  
 Demandu specialajn prezojn!

**Numero 114 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 10. Decembro 1922.**

## Honoron al la Majstro.

**La 15. decembro — ĉiujara festotago por la tutmonda Esperantistaro.**

1859 — 1922.  
 La 63-an datrevenon de sia naskiĝotago li nun povus festi, se li ankoraŭ vivus.  
 Se li ankoraŭ vivus...  
 Li vidus sian verkon maturiĝi, vidus de l' venko la antaŭradion, ĝuis la ĝojon de l' plenumita tago.  
 Se li ankoraŭ vivus...  
 Ĉu efektive li estas mortinta? Ĉu ne lia altspiranta spirito flugas ĉirkaŭ ni, malpeza, libera, malligita de l' mizera korpo? Ĉu ne li partoprenas en la solenoj, kiujn en tiuj ĉi tagoj aranĝas liaj fidelaj disĉiploj je lia honoro ĉie sur la vasta tero?  
 Jes, li vivas. Li estas inter ni. Li festas kun ni. Li ĝojas kun ni pri la atingitaj grandaj sukcesoj. Li admonas nin daŭrigi nian pacan bataladon sur la kampo, sur kiun li nin gvidis. Li kuraĝigas nin elteni ĝis la fina venko, kiu jam estas proksima.  
 Li vivas: lia spirito vivas, lia nomo vivas, lia verko vivas kaj daŭros por eterne.  
 Tiu konvinko konsolu nin pri lia frua foriro. Kaj ni, festante en jenaj tagoj la naskiĝotagon de la Majstro, promesu al li kaj al ni mem, ke ni daŭrigos lian grandan kaj noblan verkon, ke



D-ro L. L. Zamenhof.

ni alte tenos la verdan standardon de la mondlingva ideo, ke ni ne laciĝos en nia paca batalado kaj laboregado por la bono de l' homaro, ke „ni semos kaj semos konstante“. Kaj se „cent semoj perdiĝos, se mil semoj perdiĝos“ — tamen jen kaj jen el-kreskos arbeto, grandigos, portas grandiozan kronon kaj dolĉajn fruktojn: en ĉiu lando, en ĉiu urbo, en ĉiu vilaĝeto kaj soleca dometo fine.  
 Tiam estos por ni la tempo de rikolto. Tiam ni, idealistaj pioniroj de granda kulturideo, estos riĉe rekompencataj por niaj laboroj kaj klopodoj. Tiam por la Majstro ĉie ekvivigos monumentoj, ekbrilos memortabuloj.  
 Tamen la plej belan monumenton li mem starigis al si, per sia homaroma verko, per siaj noblaj vortoj kaj faroj, per sia modesta sed forta karaktero, en la koroj de siaj fidelaj disĉiploj, kiuj neniam forgesos lin.  
 La 15-a de decembro estas kvazaŭ per fajraj signoj enbruligita en niaj koroj.  
 Ni festu tiun tagon ĝenerale, ĉie kie batas koroj de Esperantistoj!

## Komerca Konferenco en Venezia.

En ET n-o 110 ni jam raportis pri la Intenco de UEA okazigi Internacian Komercan Konferencon en Italando je Pasko 1923, simile al la Konferenco pri Esperanto en Lernejoj okazinta ĉi-jare en Ĝenève. Nun UEA decidis okazigi la Komercan Konferencon en Venezia, la mondfama urbo de lagunoj kaj kanaloj, de belegaj preĝejoj kaj artaj palacoj.  
 Pri tio skribas Edmond Privat en la nova numero de „Esperanto“:  
**Komerca konferenco en Venezia.**  
 Solene ni deklaris militon — tute pacan — por venkigi la helplingvon. Neniu kredu, ke ni haltos nun por ripozi. Ĉiu monato devas alporti novajn ŝtonojn al nia domo, novan ŝtupon al nia ŝuparo. Tie ĉi ni klopodas krei taŭgajn armilojn por la tuta Esperantistaro: lastan printempon, la Ĝeneva konferenco, por la lernejoj; tiun ĉi aŭtunon, la raporto de la Ligo, por la registaroj; nun ni devas nin turni al komerco. La Centra Komitato decidis, ke okazu teknika konferenco pri tiu temo, la venontan printempon.  
 Ni vojaĝis al diversaj lokoj por elekti la plej taŭgan. Konsente kun la Itala Federacio, kaj la loka grupo „Zamenhof“ UEA oficiale kunvokos tiun konferencon en Venezia dum la paska libertempo (28. marto ĝis 4. aprilo). La Konferenco okazos sub aita protekto de la Venezia Komerca Ĉambro kaj en ĝia sidejo. Ankaŭ la Sviza Esperanta Societo proponis al la K. R. (konstanta reprezentantaro de la Naciaj Societoj) ke ĝi havu tie sian unuan kunsidon. Estus same dezirinde ke la C. K. (centra komitato) profitu la saman okazon por kunsidi tie unu aŭ du tagojn pli frue.  
 La 100 aŭ 150 delegitoj, kiuj venos Venezian, neniom forprenos el la antaŭvidebla granda sukceso de la XV-a Universala Kongreso en Nürnberg, kie ni dezirus vidi milojn da samdeanoj, kiel en Praha. Niaj germanaj amikoj tre noble montris sin pretaj rezigni la inviton al sia lando se la italoj estus pretaj organizi la XV-an. La

Itala Federacio ne opinis tion ebla. Nun en Nürnberg oni laboras energie kaj metode. Ni ĉiuj veturos ten grandamase en aŭgusto por havi nian plej multnombran popolfeston en Esperantujo.  
 Dumĝise, ĉe pasko, niaj gvidantoj kaj ĉiuj specialistoj de komerco kaj turismo renkontiĝos en Venezia por labori.  
 La loko estas tiel ĉarma, reva kaj rava, ke multaj familianoj volos ankaŭ ĝin viziti kune. Nu, la Vendredon Sanktan kaj la Dimanĉon Paskan oni fermos ĉiujn komitatojn por ke almenaŭ la plenajn tagojn ĉiuj povu pace ĝui la mirindan belecon de San Marko, la placon kun la kolomboj, la antikvan dukpalacon, la Ponton de l' Sopirot kaj ĉefe la dolĉan glitadon sur Kanal' granda Inter feaj palacoj.  
 La kunsido okazos en la komerca ĉambro kaj ankaŭ en la salonego de la Hotelo Wagner, sur la insulo Lido, kie loĝas kaj manĝos la tuta konferencanaro po 30 iloj tage. De nun ni alvokas ĉiujn partoprenantojn, ke ili sendu tiun sian nomon al UEA kaj klopodu akiri oficialan delegitecon, ĉu de komerca ĉambro, de komerca lernejo, de komerca asocio, de komerca, fervoja aŭ poŝta ministrejo, de turista oficejo aŭ organizaĵo, de foiro internacia aŭ nacia.  
 Samtempe ni alvokas al ĉiuj naciaj societoj, lokaj grupoj kaj delegitoj, ke ili grupigu kaj klasigu precizajn faktojn kaj dokumentojn pri praktika uzado de Esperanto en komerco kaj turismo. Statistikoj kaj ekspozicio devos esti preparataj por ke la konferenco povu poste publikigi efikan raporton, kiu servos kiel taŭga propagando ĉe komercaj randoj.  
 La sukceso de la Venezia konferenco povos havi sekvojn ĉe multe pli gravajn ol la rekomendo de la Ligo de Nacioj. La Internacia Komerca Ĉambro kunsidos en Roma ĝuste antaŭe kaj ni devos montri al la trapasataj delegitoj la valoron de uzata mondlingvo.  
 Tiu nova paĝo en nia historio meritas ĉies subtenon. Por ĝin sukcesigi ni bezonas personajn oferojn, ĉu per partopreno, ĉu per donaco. Tri mil svizaj frankoj estas nepre necesaj same kiel por la Ĝeneva konferenco. Ilin ni trovos lastan jaron per bonvola kolektado. Ilin ni trovos vorton, sed la trapasataj, konsciaj ekbriloj en liaj okuloj montris, ke liaj oreloj aŭdis, kaj ke la cerbo ricevis ĉiun demandon direktitan al li.  
 Sed lia mistero kaj lia aventuro signifis nenion por la intereso de doktoro Bicknell, kiam li eniris la kancelariejon por adiaŭ sian paciencon. Li, la doktoro, faris ion. Kio estis vere senekzempla en la historio de la ĥirurgio. Lin ne interesis, kiu estas aŭ kio estis tiu homo kaj tre kredeble li ne revidos lin; sed la doktoro volis kiel artisto jeji lastan rigardon sur la verkon de siaj manoj kaj cerbo.  
 »Semper Idem« konstante restis senparola. Ŝajne li malpacience atendis sian foriron. Eĉ ne unu vorton la doktoro povis eldiri el li, kio cetere lin tre malmulte ĝenis. Doktoro Bicknell tre atente esploris la gorĝon de sia paciento, rigardante la abomenan vundon kun la malrapida, kvazaŭ karesa zorgemo de amoplena ĝepatroj.  
 Tio tute ne estis agrabla aspekto. Profunda cikatro ĉirkaŭis la kolon de »Semper Idem«. Ĉiu havus la impreson, kvazaŭ tiu ĉi homo sin deŝiris el la pendumilo de l' ekzekutisto. La cikatro malaperante malantaŭ la oreloj je ambaŭ direktoj ŝajnis kompletigi la fajran zonan sur la fino de l' kolo.  
 Konservante insistan silenton, permesante sin esplorigi, kiel kaptita leono, »Semper Idem« malkaŝis nur la deziron sin eldiri kiel eble plej rapide de la publikokuloj.  
 »Bone, mi ne retenas vin,« diris fine doktoro Bicknell metante la manon sur la ŝultron de sia paciento kaj jetante lastan rigardon sur sian verkon. »Sed permesu, ke mi donu al vi bonan konsilon. La sekvantaj fojoj, kiam vi deziras provi tian eksperimenton denove, levu la mentonon kiel eble plej supren, — jen tiel... Ne klinu ĝin malsupren kaj ne buĉu vin kiel oni buĉas bovinnon.  
 Ĉio devas esti farata precize kaj rapide. Precie kaj rapide, rememoru.«  
 La okuloj de »Semper Idem« ekbrilis pruve, ke li aŭdis kaj post momento la hospitala pordo fermiĝis post li.

## Semper Idem.

De Jack London.

Doktoro Bicknell estis en rimarkinde milda spiritalato.  
 Per eta akcidento, malgrava neatento, homo, kiu nepre estis resaniĝonta, mortis la pasintan nokton. Kvankam li estis nur maristo, unu el la sennombraj malpuruloj, la hospitalestro estis maltrankvila la tutan matenon. Tiun malagraban senton ne kaŭzis la morto de la homo, ĉar li konis la doktoron tro bone; lia ĉagreno devenis de tio, ke la operacio estis farita tiel lerte. Ĝi estis unu el la plej delikataj en la ĥirurgio, ĝi estis tiel sukcesa kiel kuraĝo. Ĉio dependis de la zorgemo de la fleĝistinoj, de la estro. Kaj la homo mortis. Nento grava, malgrava neatento, sed tio sufiĉis por eksciti la fakan koleron de doktoro Bicknell kaj kaŭzi malordon en la laboro de la personaro kaj de la fleĝistinoj dum la sekvintaj dudek kvar horoj.  
 Sed, kiel jam dirite, la doktoro estis en rimarkinde milda spiritalato. Kiam li estis informita per la timanta kaj tremanta estro pri la neatendita morto de la maristo, liaj lipoj diris eĉ ne unu vorton esprimantan malkontenton. Ne, ili estis tial, ke la aludo je koleeraj vortoj eliris dolĉe el ili kaj poste fariĝis afabla demando pri la stato de la dua favorato. La estro, pensante, ke la doktoro eble ne bone komprenis la sencon de lia raporto, ripetis ĝin.  
 „Jes, jes,“ respondis doktoro Bicknell malpacience, „mi komprenas. Sed kiel fartas nia »Semper Idem«? Ĉu li estas preta foriri?“  
 „Jes, oni helpas al li sin vesti,“ respondis la estro, kontenta, ke denove trankvilo regos en la saturitaj per jodino muroj.  
 La resaniĝo de »Semper Idem« rekompencis al doktoro Bicknell la perdon de la maristo. La homa vivo estis por li nenio; malagrablaj sed neeviteblaj estis akcidentoj en lia fako, kaj akcidentoj estis por li ĉio. Ĉiuj homoj, kiuj konis lin, opinis, ke neniam pli kuraĝa kaj pli diligenta

viro staris ĉe la operacia tablo. Li ne estis sentemulo, li ne posedis kaj tial ne toleris emocion. Lia karaktero estis akurata, preciza, scienca. La homoj estis por li ne pli multe ol ludfiguroj sen individueco kaj valoro.  
 Sed alia estis la afero rilate akcidentojn. Ju pli iu homo estis rompita, ju pli malcerite li tenis sian vivon, des pli granda estis lia signifo por la okuloj de doktoro Bicknell. Li estis inklina forlasi laŭrimitan poeton, suferantan je ordinara malsano, por iu sennoma vundita vagulo, kiu mokis ĉiujn leĝojn de la vivo, ne volante morti. Same, kiel infano forlasus »Punch kaj Judy« por la cirko.  
 Tiel estis ankaŭ en la okazo de »Semper Idem«. La mistero de tiu homo ne impresis lin; same ne lia silento kaj kaŝata romano, kiun la raportistoj sensecie kaj senfrukte profitis en diversaj dimanĉaj ĵurnaloj.  
 Sed la gorĝo de »Semper Idem« estis tranĉita. Jen estis ĉefa devo por li. Tien koncentrigis lia atento. La kolo tranĉita de orelo ĝis orelo, kaj neniu ĥirurgio el milo, kiu riskus eĉ fingromovon por la eblo de lia resaniĝo. Sed dank' al la rapida helpo de la urbaj saniaristoj, kaj al doktoro Bicknell, li estis redonita al la mondo, kiun li intencis forlasi.  
 La kunlaborantoj de doktoro Bicknell mallevis la kapojn, kiam ili informiĝis pri la stato de la paciento. „Neeble!“ — ili diris. La gorĝo kaj faringo estis efektive tranĉita kaj la perdo de la sango terura.  
 Sed ĝuste pro tia antaŭjuĝo doktoro Bicknell uzis metodojn kaj aranĝis procedojn, kiuj ekŝancelis ilin, malgraŭ iliaj fakaj konoj. Kaj jen tiu homo resaniĝis.  
 Jes, tiun ĉi matenon »Semper Idem« estis forlasonta la hospitalon sana kaj forta. La ĝajeco de doktoro Bicknell tute ne estis malpliigita per la raporto de la hospitalestro, kaj li ĝajne sin preparis por ordigi la haoson de unu infana korpo, kiu falinte frakasiĝis sub la radoj de elektra veturilo.

Kiel multaj rememoros, la akcidento de »Semper Idem« vekis multe da nebezona sed natura scivilo. Li estis trovita en sia loĝejo kun tranĉita gorĝo en tia amaso da sango, ke ĝi malsuprenfluis tra la planko en la suban ĉambron. Evidente, li faris tiun agon starante, klininte la kapon antaŭen, por povi rigardi je la lasta foto la fotografajon, kiu staris sur la tablo apogita al kandelingo. Tiu ĉi pozo ebligis al doktoro Bicknell lian savon. Tiel terura estis la ektranĉo de la razilo, ke, se li klinus sian kapon malantaŭen, kun streĉita kolo kaj kun malelastaj muskoloj, li sendube detranĉus al si la kapon.  
 Dum tuta tempo, kiun li pasigis en la hospitalo, por reaktiri la vivon, eĉ ne unu vorto eliris el lia buŝo.  
 Neniu lin konis, neniu lin vidis aŭ aŭdis pri li antaŭe. Liaj vestoj kaj ĉirkaŭaĵoj estis tiuj de plej simpla laboristo; tamen liaj manoj estis la manoj de »gentleman«. Sed eĉ ne peceton de iu skribaĵo oni trovis ĉe li, nenion. Nur unu objekto ekzistis, kiu povus servi kiel indiko de lia pasintajo kaj de lia vera scia rango.  
 Kaj tiu sola objekto estis la fotografajo. Se ekzistis simileco, la virino, kiu rigardis sincere el la ornamita kadro, certe estis mirinda estaĵo. Ĝi estis amatora fotografajo, kaj per tio la detektivaj senluziĝis, ĉar mankis la nomo de faka fotografisto. En angulo de la kadro per delikata virina skribkaraktero estis skribite: »Semper idem, semper fidelis« (ĉiam la sama, ĉiam fidela) kaj tiel ŝi aspektis.  
 Kiel multaj rememoros, tio estis neforgesebla vizaĝo. Malica aludoj kaj supozoj estis dum tiu tempo publikigataj en ĉiuj ĉefaj gazetoj, sed tio kaŭzis nenion alian ol nekontentigan scivolon de la publiko kaj senfinajn skribaĵojn de la versaristoj. Pro manko de speciala nomo, la savita sinmortigemulo estis konata al la mondo kaj al la hospitalistaro, kiel »Semper Idem«, kaj vere li restis »semper idem«. La raportistoj, detektivoj kaj fleĝistinoj malempirinte fine lasis lin trankvila. Oni ne povis lin igi eldiri eĉ unu

denove tiun ĉi jaron per la sama procedo.

Ni dankas antaŭe ĉiujn donantojn. Ili mono estas uzata ŝpare kaj efike. Ni estas en plena milito. Nun al laboro kaj Venetia! Esperanto por komerco kaj turismo!  
*Edmond Privat.*

Monhelpojn por la Internacia Komercia Konferenco oni direktu al la Centra Oficejo de UEA en Genève, 12, Boulevard du Théâtre.

## Sciigo de Itala Esp. Federacio pri la Venezia Konferenco.

Kun vera fiereco la Itala samideanaro pretiĝas akcepti la eminentulojn de nia movado, la fakulojn de la priiraktota temo, la samideanojn ĉiunacian allogatajn de la ĉarmo de l' Reĝino de Adriatika Maro kaj de l' okazo gravigi per sia multenombra ĉeesto la gravecon de tiu kunveno, kiun la alta parolo de D-ro Privat proklamis jam de nun „nova paĝo de nia historio“.

Bedaŭrinde la italoj ne havis ankoraŭ eblecon gastigi „Universalan“. Des pli do ili sentu, kaj certe sentos, la honoron al ili faritan kaj la devojn de tio venantaj. Kaj varme ili klopodos por la bona sukceso de l' afero.

Programo ankoraŭ ne estas fiksita precize. Sed jam silueto tre interesa kaj signifoplena videbligas. Pli ol verŝajne kunestos tuj antaŭ aŭ post sekvos la ĉefan Internacian Konferencon pri Esperanto en Komercio: kunveno de foiroj, kunveno de Centra Komitato kaj de Konstanta Reprezentantaro, la kvazaŭ-Registaro kaj kvazaŭ-Parlamento de Esperantujo laŭ la Helsinki'a — Konstitucio; same la enlandanoj havos tie siajn kunvenojn de Nacia Konsilantaro kaj Delegitaro de Itala Esp. Federacio kaj de l' gvidantoj de l' Regionaj Institutoj de Esp. ĵus regule kunigintaj en Itala Katedralo de Esp.

Tio rilatas laborojn. Por liberhoraj kaj ripozaj amuzoj la mirinda urbo kaj la vigleco de lokaj samideanoj donos sendube rimedojn taŭgajn, ke la alvenintoj nur bedaŭros sian devon forveturi.

Por ĉio ĉi tamen ĉefa necesajo estas nun, ke la organizestraro de l' Konferenco kaj la Itala Esperantistaro sentu, ke la animo, la kuraĝigo, la fidemo de l' tutmonda samideanaro sekvas, helpas ilin.

Tio okazu trjoble de nun sume: 1. kunigu materialon por praktika impresiga diskutado kaj konkludaro; 2. havigu k. e. p. da delegitecoj kaj apogoj de komercaj, turismaj institucioj; 3. helpu la subtenolektadon jam malfermita de UEA.  
*(Presoficejo de IEF.)*

## Reala Idealismo.

De Teo Jung.

Internacia lingvo plenumas esence praktikan celon. Tion pruvi al la reale pensanta, egoista mondo, devas esti nia ĉefa zorgo. Kiam ni povos konvinki la mondon, ke per alpreno de internacia lingvo ĝi profitos je tempo, peno kaj mono, nia ideo estos venkinta. Ĉio plua venos per si mem. Ke la homoj de diversaj gentoj, kiam ili havos la eblecon senpere interligi uze de komuna lingvo, pli bone komprenos kaj pli alte estimos unu la alian, estas nedubinde. Ke la kulturo kaj homara progreso multe gajnos per enkonduko de tut-homara lingvo, tion neniu neos.

Do, ni tute ne bezonas tiom klopodi tuj transformi la homojn je anĝeloj, kiom montri al ili la praktikecon de komuna lingvo.

Ni povas esti arda idealistoj, ni povas entuziasme ŝati, eĉ amli nian idealon; sed — turnante nin al la vasta publiko — ni ne devas forlasi la „firman teron“ kaj vagi en aliaj devoj, neatentegibaj por la granda amaso; tion ni povas fari sidante inter niaj kvar muroj aŭ promenante en serena sunplena naturo aŭ sub klara nokta ĉielo stelkovrita, ĉu sola aŭ kunestante kun kelke da tute samagorditaj animoj.

Dum tiu tago doktoro Bicknell havis multe da laboro kaj jam estis malfrua posttagmezo, kiam li ekbruligis cigaron preta forlasi la operacian tablon. Ŝajnis, kvazaŭ la suferantoj ĉiam estis pretaj, sin kuŝigi sur ĝin. Sed la lasta paciento, maljuna ĉifonulo kun romplita ostoj jam estis forprenita, kaj la unuaj fumetoj komencis ondi super la doktora kapo.

Subite la sonorilo de rapidanta sanitarista roto ekaŭdiĝis sur la strato kaj ĝin sekvis la neevitebla eniro de l' portiloj kun sia terura ŝarĝo.

„Metu tion sur la tablon,“ diris la doktoro sin turnante, por lokli oportune sian cigaron — „kio estas?“

„Sinnmortigo — tratanĉo de la gorĝo,“ respondis unu el la portistoj. „Tiu ĉi homo falis teren sur „Morgan“-Aleo. Malmulte da espero, mi pensas. Li jam mortis.“

„Bone, ni rigardu lin!“ La doktoro sin klinis al la portiloj. La sinnmortiginto restis senmove kuŝanta.

„Semper Idem“ revenis,“ diris la gardisto. „A...“ respondis la doktoro kaj denove foriris. „Ne malbone li procedis tiu ĉi fojon. Li obeis mian konsilon laŭvorte. Ĉi tie oni ne bezonas min, forprenu lin en la kadavrejon.“

Doktoro Bicknell forŝulis la cindron de sia cigaro kaj ĝin denove ekbruligis. „Tio,“ li diris, ekŝutante kaj rigardante la gardiston, „egalvaloras tiun, kiun vi perdis al mi la pasintan nokton. Ni kvitiĝis!“

El la angla lingvo tradukis Maksymilian Alter.

La mondo ne volas esti konvertata, sed konvinkata. Se ni venas al ĝi kvazaŭ apostoloj de nova religio, ĝi nur mokidas nin. La malmultaj sanktuloj, kiujn ni atingas per niaj preĝoj kaj predikoj, trovus ankaŭ sen tio la vojon al nia movado, ĉar — eĉ se ni atentigus en nia propagando nur pri ĝiaj realaj, pure praktikaj celoj — ili tamen tuj ekkonus en ĝi la idealon, kiun ili mem defendas.

Pro tio tute ne estas necese, ekstere tro multe akcenti ian specialan internan ideon kernantan en nia movado; ĝin ni fleŝu interne en niaj koroj kiel sanktan sekretojn, kiel delikatan trezoron; ĝin ni tenu plejble senmakulita de l' fikonduto de la ekstera mondo.

Mi ne hontas konfesi min entuziasma idealisto, ano de la t. n. „interna ideo“ de l' Esperantismo; sed mi gardos min, provi konverti nekverteblulojn. Laŭ tiu vidpunkto oni devas kompreni miajn konstantajn avokojn al praktik-ejo, racioco kaj reala pensado.

„Profesiaj revemuloj“ ni estas, diris unu el niaj plej entuziasmaj samideanoj, unu el niaj plej talentaj poetoj. Bedaŭrinde naŭ dekonoj el ni estas tiaj „revemuloj“. Sed ni devas fariĝi „realaj idealistoj“. Alie ni neniam trasukcesos.

Feliĉe unu dekonon de la Esperantistoj tamen ŝajnas esti „realaj idealistoj“. Almenaŭ de tempo al tempo ni aŭdas kuraĝajn voĉojn avertantajn pri la danĝero de la memridindigo. La mondo ĉa „ŝatas nigri la radiantan, kaj la majestatan fir en la kolon“, kiel skribis la poeto. Tion ni ĉiam memoru en nia publika propagando ĉe la granda amaso.

En n-o 107 s-o Klimas elparolis parte tre pravajn konkludojn, kaj nun venis eĉo el Finnlando, kiu ja sonas iom akre, sed kiun mi ne volas malhavigi al la Esperantistaro. Cetere, mi rimarkigas, ke mi neniel estas „herezulo“; mi ripetas, ke mi ankaŭ estas ano de la tiel arde laŭdata kaj tiel akre kritikata „interna ideo“ (kompreneble, mi havas pri ĝi mian specialan percepton), sed ke mi ĝin ne pli ol necese montras al la — bedaŭrinde — tro materiala, tro egoista mondo.

Jen la letero el Finnlando, direktita al mi de s-ano Oskari Eriksson en Vitouri:

Estimata sinjoro!

Permesu al mi esprimi mian dankon pro la artikolo de A. Klimas „Postsignoj de tro granda idealismo“ en ET n-o 107. Ne, ĉar mi kvazaŭ trovis novan ideon en la artikolo — mi jam delonge kun bedaŭro legis tro ardaĵajn admonojn pri „internaj ideoj“ de la Esperantismo —, sed ĉar vi per la enpago de la artikolo montris ŝatindan kuraĝon. Certe vi nun ricevos foron da riproĉoj de patenteperantistoj, konsciencaj plenumantoj de ĉiuj dogmoj kaj sakramentoj de la „vera Esperantismo“. Ne domagas, se vi, ho herezulo, ekscios, ke troviĝas ankaŭ aliaj mallortaj animoj en la Esperantistaro.

Mi persone aprobas multajn el la „internaj ideoj“. Mi nur ne povas konsenti, ke tiuj ideoj estu proklamataj kiel kondiĉoj, plenumotaj de ĉiu, kiu deziras eni la lingvon.

Mi tre deziras esprimi mian konsenton al la verkinto, sed mi ne konas lian adreson. Bonvolu sciigi al li, ke lia artikolo trovis bonan akcepton ĉe multaj finnlandanoj.

Mi jam pretiĝis ĉi-supre publikigitan artikolon, kiam alvenis rimarkinda artikolo pri la sama temo de la Orienta Grupo en Dresden. Ankaŭ mi opinias, ke fakte ne ekzistas „dilemo“, se ni nur sukcesos, en ĝusta kaj prudenta maniero kunigi idealismon kun realismo. Ni ne estu pure egoistaj praktikuloj, sed ni ankaŭ ne apliku la malan ekstremon. La meza vojo certe estas la preferinda. Ĉi-sekvante la artikolo de la Orienta Grupo en Dresden:

„Postsignoj de tro granda idealismo“ estas la surskribo de ĉefartikolo en ET n-o 107. Pri tiu ĉi artikolo multaj legantoj miris, ili sentis kvazaŭ malvarman duŝon sur varman entuziasmon; ili indigne demandas: ĉu idealismo povas esti tro

## La roko.

de H. Heine.

*Nokton dormis la nubeto ora  
Sur la brust' de roko grandegulo.  
Ĝi forflugis en matena brulo,  
Gaje ludis en lazur' kolora.*

*Tamen restis akvo, signo certa,  
Sur la brusto larĝa. Roko sola  
Staras en pensigo senkonsola  
Kaj sensone ploras en dezerto.*

M. Soloviev.

## La aglo kaj la suno.

de Antoni Wyslouck.

Sur alta, sovaĝa, blanketa roko, ĉe la rando de l' egiptaj dezertoj, sidis aglo, — kaj meditis...

Cirkaŭe rokoj mirinde formitaj, nudaj, sen eĉ lometo verdajoj, musko aŭ herbo, lumantaj per malbonsigna malvivula paleco, — tie pli malproksime la ora rubando de Nilo, brilanta divers-kolore, — kaj aro da nemoviĝemaj palmoj, kvazaŭ ŝtonigintaj, dronantaj en la suno, — kaj de la alia flanko la dezerto, grandega, senluma kiel maro, kun grandaj grandiozaj ondegoj de flava sablo, malviva, silentanta per ia mirinda trankvilo, kvazaŭ ĝi kaŝus en si sekretojn terurajn, malgaja, kiel homa koro, en kiu komplozas plej sanktaj sentoj kaj en kiu regas malpleno kaj mallumo...

Sidadis la aglo, — kaj meditis...  
Li sendis la rigardojn ĉirkaŭen, — jen al la Nilaj akvoj, kvazaŭ flamantaj sub la influo de l' suno, — jen al la palmoj, dronigantaj, kun trankvilo kaj nemoviĝema ravireco, siajn foliojn en la radioj de l' suno, — jen al la blankaj rokoj per lumo surverŝataj, — jen al la senlumaĵaj sabloj de l' dezerto, silentantaj, per eterna trankvilo.

granda? Estas nepre necese, ke ni meditu pri la afero, ĉar la aŭtoro de la artikolo certe pripensis ĉiun vorton, kiun li skribis, kaj ET ne estus akceptinta malvaloran verkajojn.

Ĉiu leganto, kiu konas la evoluon de nia movado, certe memoras la gravan paroladon de nia Majstro en Genevo 1906. Energie kaj pasie li defendis Esperanton kontraŭ la praktikuloj, kiuj volis forigi el la agado de l' Esperantistoj ĉion idean, ĉiun spiritan celadon. Se tio okazus, li eĉ volis forjeti la verdan stelon, kiu sidis sur lia brusto!

Ni vidas la du kontrastojn, pri kiuj ankaŭ nia samideano Klimas parolas. Kio estas la vero? Kie estas la ĝusta vojo? Ĉu s-o Klimas ne estas prava, ke ankaŭ la praktikuloj, la realistoj estas veraj Esperantistoj, kiuj helpas al la disvastigo de la internacia lingvo? Sed ĉu la Majstro, tiu granda idealisto, ne ankaŭ estas prava, ĉu estas konsilinde forlasi lian vojon? Kiel eliri el la dilemo?

Sed fakte dilemo ja tute ne ekzistas! La homoj estas malsamaj, kelkaj pli inklinaj al idealismo, aliaj al realismo. Ĉu unu el la du kategorioj estas pli multnombra ol la alia, ne estas gravaĵo. Permesu al ni klarigi la demandojn per bildo, komparo.

Jen velsipo en la haveno. Dilligentaj homoj alportas ŝarĝon, komercistoj, metiistoj, kamparanoj — ĉiuj deziras forsendi siajn produktajojn kaj komercaĵojn al malproksimaj landoj.

Sed senmove kuŝas la ŝipo, ĉar mankas la vento, la moviĝema ago. Jen, subita movo, la veloj ŝveliĝas, la vento estas la granda helpanto! Same, kiel en nia alegorio, ĉiuj fortoj kunigu, praktika laboro kaj idealista agemo, ĉar labori ni ĉiuj devas, ĉu laŭ sia forto. Ankaŭ la vento bezonas lertajn manojn por esti kaptata kaj uzata. Esperantisto estas, kiu laboras por Esperanto aŭ per Esperanto, sed li nepre laboru, li ion ajn faru. Li propagandu, li parolu, instruu, negocu, verku, kantu, pentru, desegnu, fabriku ion ajn, aŭ almenaŭ li fumu Esperantan cigaredon. Li abonnu gazetojn, aĉetu librojn kaj multon legu, antaŭ ĉio la verkojn de nia Majstro: legante kaj uzante la lingvon „iom el lia idealismo eniros la koron.“ (Laŭ Privat.)

Ĉiu agado, eĉ la plej malgranda, helpas, ke nia ŝipo nage sur la maro, idealismo kaj realismo ĝin antaŭen puŝos.

Antaŭen do, kun la vortoj de Ifigenio:

Ho koro,  
Ne batu tiel forte! Al la stelo  
De la espero, kiu ekbriletis,  
Ni remu do kuraĝe kaj prudente.

## Flugfolieto.

Se entute — tute! Mi malŝatas la aferojn plenumatajn nur duone. Ni demandu nin sincere: Ĉu ni dediĉas al la lernado de Esperanto la necesan kvanton je energio, persistado kaj amo? Mi dubas, ĉu ĉiuj senskrupule povos respondi: Jes. La plimulto el la „komencantoj“ kaj ankaŭ granda nombro el la „finitoj“ konsideras Esperanton kiel sporton, kiel amatorojn kaj — ili estas pravaj! La tro fervora instruanto ja diris al ili, ke Esperanto estas tiel facila, ke eĉ suĉinfanoj povas lerni ĝin. Kial do penadi? Ĉi tiu troigo, farata kompreneble bonintence, en la realeco ekstreble malutilas al nia afero; ĝi tente instigas al supraĵeco koncerne la studadon. Certe la Esperanta gramatiko estas tre facila; sed la lingvo konsistas el frazoj. Malgraŭ plej facila gramatiko oreloj kaj lango bezonas longtempan, praktikan ekzercadon, por povi kompreni kaj redoni frazojn. Alia afero, ne malpli grava, estas, ĉu la frazoj distingiĝas per korekteco; en tio nin helpas la facileco de la gramatiko. Sed la komprenado kaj parolado per si mem, postulas ĉiu-

Kaj lia rigardo timema, netrankvila strange kontrastis tiun solenan impreson de trankvilo kaj silento, reganta ĉirkaŭe.

Io lin turmentis, lian koron aglan — li suferis. Naskiĝinte tie malproksime, sub la negro de l' Alpoj suproj, sur la ĉielaltaj rokoj granitaj, — estante ankoraŭ aglido li jam ekamis la sunon...

Per flugiloj ankoraŭ malfortaj, sed kun fortoŝtreĉo kaj penego li grimpis pli kaj pli alten, por pliproksimiĝi al la suno sen malhelpo kaj baro...

Kiam ĝi brilis hele, inter la klaraj bluaĵoj, la aglido ekgojis gaje batante per siaj flugiloj kaj ravite suprenrigardis, kie flamis la amata disko ora kaj al la klaraj puregaj akvoj de l' montaj lagoj, en kiuj sin spegulis la suno, — kaj per sia beko trinkatis la roserojn, kiuj reflektis la adoratan astron — kaj bone li sentis sin...

Sed kiam la Alpa ventego ekbrulis sur la suproj, kaj de l' okcidento leviĝis la nuboj sin volvante kaj forprenis la sunon-amatinon kaj eksploris per densa pluvo kaj kvazaŭ per funebra krepo ĉion vualis, malgojdis kaj ploris la aglida koro.

Kaj kreskis la aglido, kaj plifortiĝis liaj flugiloj — kaj per kuraĝa flugo li konstante pluen flugis super la plej supra pintoj kaj atente rigardis la sunon, kaj gojis pro ĝi, kiam ĝi lumis; sed kiam li ĝin ne vidis, li tiom pli malgojdis.

Kaj li eksciis, ke jen sude estas lando, kiu kiel li ekamis la sunon, lando, kie la suno brilas konstante inter la bluegaj lazuroj, kie nebulo ĝin kovras nenie, kie regas helo, kie estas sencese serena vetero.

Li forlasis do sian helmajn suprojn, ĉielaltajn, granitajn rokojn, kaj la verdajn ridetantajn valojn Alpajn kaj brilantajn medietajn akvojn montajn de la lagoj, kaj forflugis al la lando de l' suno.

okaze la saman laborenergon, preskaŭ sendepende de tio, ĉu la gramatiko estas facila aŭ ne. Se ni dediĉas al la lernado kaj plena akirado de Esperanto la saman diligentecon kaj seriozecon, kiun ni kutime dediĉas al la lernado de fremdaj, naciaj lingvoj, ni baldaŭ konstatos evidentan progreson en la ĝusta, praktika uzado de nia lingvo. Bedaŭrinde mi konas multajn Esperantistojn, kiuj restas dum sia tuta vivo „komencantoj“. Tio ne daŭru! Ni ĉiuj fariĝu „finitoj!“ De hodiaŭ ni ekdecidu lerni Esperanton perfekte: ne nur la gramatikon, sed ankaŭ la purecon de l' skriba kaj parola stilo. Tiaokaze la granda publiko fidos al nia afero kaj baldaŭ ĝi venkos. Mi malŝatas la aferojn plenumatajn nur duone. Se entute — tute!

## Por resti justa.

En n-o 108 mi skribis recenzon, eĉ „iom pli ol recenzo“, pri la unua numero de „Literatura Mondo“. Kiu serioze pensas kaj ne jam anticipu laŭdas ĉion, kio estas Esperanteca, devas konsenti, ke la recenzo estis justa. Fakan literaturan revuon oni ja devas, simile kiel libron, rigardi pli severe, precipe laŭ enhavo kaj lingvaĵo, ol iun ajn alian gazeton.

Sed por resti justa, mi devas konfesi, ke la dua numero de „L. M.“, ĵus veninta sub miajn okulojn, jam konsiderinde plibonigita. La titolpaĝo estas pli bongusta, la enhavo ne unuflanke hungara sed pli internacia kaj ĝenerale ankaŭ pli bona. Ne multe ŝajnas al mi valori (je literatura vidpunkto) la longa kaj frazema „Serceto“, tiom pli interesas seriozajn legantojn la pensiga dialogo „Ĉe l' rando arbara“. La ampoemo „La juna princo“ de Rabindranath Tagore, tradukita de K. de Kalocsay, estas ravanta juveleto. Ankaŭ la dua numero enhavas aldonon de muziknotoj kaj plaĉajn reproduktajn de pentraĵoj. Pri la nemultaj kritikindaĵoj koncernenstilon kaj gramatikon kaj pri kelkaj preseraroj mi volas hodiaŭ silenti; sed denove mi ĝenas la rubriktitolo „Disputo“, ĉar evidente ĝi devas esti „Diskuto“.

Kion mi plue diris en n-o 108 pri la principo, tion mi devas restigi ankoraŭ nun. Mi ne volas diri, ke ET estis nepre necesa antaŭ ĝia ekzistado, sed hodiaŭ — mi opinias — ĝi fariĝis tiel grava apartenaĵo de nia movado, ke ĝi jam estas necesa. Do, antaŭ ĉio, krom la naciaj revuoj, la semajna ĵurnalo estas subteninda. Se poste restos ankoraŭ sufiĉe da mono al sufiĉe da abonemuloj, ili abonnu laŭdezure ankaŭ fakajn revuojn. Mi ne scias, ĉu ĉiuj samideanoj aprobas tiun vidpunkton, mi ankaŭ ne pretendas tion. Ĝi estas mia propra kaj tute persona vidpunkto. Ĝi estas principo, kaj laŭ tiu principo mi devas paroli kaj agi.

T. J.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperanto en Helsinki.

La 27. sept. kunvenis aro da personoj, interesigintaj pri fondo de nova societo Esperantista en Helsinkio. La kunvenon malfermis s-o Albin Sandsröm klarigante la kaŭzojn, kiuj instigis al tio. La sperto jam de multaj jaroj montris, ke la ekzistanta unu societo „La Polusstelo“ ne kapablis en si kolekti ĉiujn Esperantistojn kaj Esperanto-interesigintojn en la urbo, precipe ne la samideanojn inter la svedlingva parto de la loĝantaro. Post la parolado, la fondo de la proponita societo estis unuanime decidata kaj kiel nomon oni akceptis Sveda Esperanto Societo „Nordlumo“ en Helsinkio. Kiel prezidanto estis elektita s-o D-ro H.J. Runeberg, v. prez. s-o Direktoro Albin Sandsröm, sek. s-o Stud. Erik Gadd, kasisto f-ino Aline Sandsröm, kaj ceteraj anoj de la estraro s-o Lektoro K. Sev. Ahoenius kaj s-o Robert Bergh.

Per forta flugo kun tuta fervoro de sia juna koro li antaŭenrapidis.

Li vidis sub si belegajn kastelojn, grandajn kaj homoplenajn urbojn — kaj grandegajn verdajn ebenaĵojn kaj arbarojn el cipresoj kaj pinoj — jen denove ondigeblajn akvojn de l' maro, ŝaŭmigajn, bruegajn, timigajn, sed ĉio ĉi ne interesis lin, — li flugis al la lando, kie li ĝuos la sunon-amatinon, pli multe ol antaŭe — sen interrompo.

Kaj fine li ekvidis la palmajn boskojn kaj trankvilajn, solenajn akvojn de Nilo, kaj la senbordan maron el flavaj sabloj, kaj la ŝtonegojn de l' piramidoj kvazaŭ gardostarantaj Egipton...

Lacigita, sed plena de gojo li sidigis sur roko, — li trinkis la lumon kaj la sunon per la okuloj kaj per ĉiuj fibroj de sia korpo, ili kvazaŭ eniĝadis, enprofundiĝadis en la sunon...

Sed nelonge daŭris la trankvilo kaj feliĉo... Sur la klara ĉielo estis eĉ ne unu nebuleto, la suno brilis hele, per lumo kaj varmo, kaj per ili superverŝis ĉion.

Sed vesperiĝis, — la suno malleviĝis al la tero, superverŝis ĝin per la lastaj faskoj de lumo, jetis mil kolorojn sur Nilon, per ora ruĝo koloris la arbarojn de l' palmoj kaj la dezerton kaj la ĉielon, — kaj dronis en la melankoliaj sabloj de Sahara...

La nokto ŝajnis al li pli longa ol ĝis nun, — ĉi tie li sentis sin pli proksima al la suno, do la distigo ŝajnis al li pli kruela, pli malfacila, pli neeltenebla, — kaj li insultis la stelojn tremantajn, ekbrilitajn timeme sur la ĉielo, kvazaŭ ili volus lin konsoli post perdo de la suno kaj la lumo, kiu per sia brilo pala vane ĝin volis anstataŭi.

Mateniĝis.

Per gojiga hela lumo denove pleniĝis ĉio, ekmurmuris kontentigite la palmoj, ekridetis mal-

La venonta numero enhavos artikolojn kun ilustraĵoj pri

## Bialystok

la nask-urbo de nia Majstro.

La 2. nov. la societo aranĝis publikan propagandan feston. Ĉeestis kvindek da personoj. La Prez. D-ro Runeberg faris Esperante salut-parolon, klarigante la noblan esencan kaj celon de la Esperantismo. S-o Albin Sandström en interesa kaj instruanta svedlingva propaganda parolado raportis pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj precipe pri la valoraj faktoj, kiuj enhavas la raportoj de la Generala Sekretariejo. La ceteran programon plenigis solludo je violono kaj piano, deklamo, laŭlego kaj fine dancado.

**Propaganda vojaĝo de s-o Privat.**

Reveninte el Italio, kie li pasigis du semajnojn pro tre gravaj antaŭlaboroj cetere bone sukcesintaj, s-o Edmond Privat komence de novembro veturis al Paris, kie li renkontis plurajn direktantojn de nia movado kaj faris kun ili kelkajn decidojn.

Poste en Besançon, ĉe la Respublika Klubo, antaŭ granda ĉeestantaro li faris plej sukcesan paroladon pri Societo de l' Nacioj. Morgaŭ, ĉe la Komerca Cambro de Besançon, kiu estis tiam pentata, li publike paroladis pri Esperanto; la tiea Grupo sekve refondiĝis.

La sekvantaj tagojn senripoze s-o Privat faris propagandajn paroladojn en Vienne (Isère), kie ĉeestis 500 personoj dank' al klopodoj de ges-oj Huline kaj de s-o Mousis; en Saint-Etienne, kie nova kurso malfermiĝis laŭ iniciato de s-o Gabert; kaj en Lyon, kie laŭ proponoj de s-ino Farges kaj de s-o Sandelyon 60 personoj nun ĉeestas la trikunvenan elmontraron pri Esperanto. En tiuj kvar urboj, s-o Privat faris utilajn klopodojn ĉe la Komercal Cambroj; eminentuloj, precipe membroj de tiuj Komercal Cambroj, ĉeestis liajn paroladojn; gazetot tre favore raportis.

**Esperanto ĉe Bologna Universitato.**

Bologna Universitato, la plej malnova universitato en Italio kaj onidire en la tuta Eŭropo, havos en venonta jaro la unuan oficialan kurson de Esp. elektita por la studentoj de Beletristika-Filozofia fakultato kaj de Supera Pedagogia Lernejo. La kurso gvidos Kav. Adv. Filippo Palmegiani, Ef. Membro de Itala Katedro de Esp. laŭ preciza decido de Lia Ministra Moŝto por Instruado.

**Esperanto en la praktiko.**

En la novembro numero de „France-Esp.“ s-o P. Gourlay, ĉefredaktoro de ĵurnalo „Le Cuir“ (la ledo) publikigis tre interesan artikolon „Kiel kaj kiel franca komerca revuo devas uzi Esp.“. En ĝi li diras, ke lia Esp. korespondado kun la fojroj pruvis, ke „Esp. per sia logiko kaj klareco admirinde adaptiĝas al la komerca korespondado“. El teknika vidpunkto „ni trovas necesa rimarkigi la riĉecon kaj flekseblecon de esprimo en Esp., kiu perfekte adaptiĝas al la traduko de metiaj terminoj tre specialaj uzataj en la leda industrio“.

**Esperanto en Holando.**

En Rotterdam komenciĝis kurso en la „Popol-Universitato“ kun 60 gelnantoj. Gvidas s-ino Isbrücker el Hago.

En Hago „Fine ĝi venkos“ organizis 2 kursojn: por komencantoj gvidata de s-ino Roskes por progresintoj gvidata de s-ino Isbrücker. S-o Ravesteyn gvidas kurson por anoj de la vojaĝ-unuigo.

En Veendam, komenciĝis 2. okt. kurso sub la protekto de la societo pri la profito de la publiko. Gvidas s-o P. van Dokkum, estro de la lernejunuigo en Veendam.

En Helder 28. okt. la grupo „Nova Sento“ aranĝis sukcesplenan prelegon de s-o Ravesteyn el Hago kun lumbildoj pri la kongreso en Helsinko. Ont aranĝis novan kurson.

